


DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

✧ dumonata kristana revuo en esperanto ✧ n-ro 3 (846) 2004 ✧



**Adolf Burkhardt
(1929-2004)**

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta
kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj
landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri
Jesuo Kristo.

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerkerk
☎ +31 251 231941;
✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn,
Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074
Heilbronn, Germanio; ☎ +49 7131 162688;
✉ SLKruenger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€ 20,- ☛ Membro-subtenanto € 30,- ☛ Nura
abono: pagante rekte al KELI € 16,- ☛ pagante al
Libroservo € 18,- Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI ☛ Se
estas en via lando UEA-poŝtgironto (informiĝu
ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto
kelk-p de KELI ☛ Nederlanda poŝtgironto de
KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Venet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: € 16,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe,
ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo HEJME Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎ +48 32 2650038; ✉ esperanto@hejme.e-tools.pl

ENHAVTABELO

- 51 Forpasis Adolf Burkhardt
- 52 Forpasis Jaap VAN DIJK
- 53s. Memore al Adolf
- 57 Mardo — parto dua, de Gerrit BERVELING
- 60 Sankta Birgitta, de Arne LUNDKVIST
- 63 Se Jesuo Kristo ne releviĝis, de Bayo AFOLARANMI
- 70 „Eŭropa Bulteno” reviviĝas
- 71 Jara raporto el Kongolando
- 72 Luther en la kastelo Coburg, de Siegfried KRÜGER

Redaktoraj vortoj

Karaj belegantoj, karaj ge-KELI-anoj,
tiu ĉi periodo estis por ni Esperantistoj,
kaj por ni KELI-anoj tre malĝoja, ĉar ni per-
dis fratojn, amikojn, samideanojn. Inter
ili troviĝas nia multjara prezidinto, Adolf
BURKHARDT. La tuta KELI kondolencas al Gre-
te kaj la infanoj, kaj ankaŭ al si mem, ĉar fakte
ni perdis familianon. Ni ankaŭ volas kon-
dolenci al nia sekretariino, kiu perdis sian
karan Jaap-on. Mi bone memoras mian la-
stan viziton al ilia domo, kaj lian ridon. Eks-
ter KELI, Esperanto perdis ankaŭ samperio-
de unu el siaj motoroj, Georges LAGRANGE,
kiun kelkaj konis.

La laboro de redaktoro, se ne ĉiutaga la-
boro, postulas tamen laboron. Kaj en tiu la-
boro, povas esti kelkaj misoj. Ekzemple, mi
perdas la spuron de aŭtoro de teksto, aŭ mi-
sindikas tradukiston. Mi petas pardonon al
Manfred STENBERG kiu tradukis el la sveda.

En tiu numero, krom paĝoj pri Adolf kaj
Jaap, vi legos la finon de la rakonto de Ger-
rit BERVELING pri lia mardo, kaj pri la vivo de
Sankta Birgitta.

Ĝis baldaŭ en Ĉeĥio, kaj la Sinjoro be-
nu vin ĉiujn.

Philippe COUSSON

PRI ADOLF BURKHARDT

GRANDULO DE LA KRISTANA ESPERANTO—MOVADO

La 2an de aprilo, je la horo 17.50
mortis Adolf BURKHARDT,
luterana pastoro, de 1961 ĝis
1975 kaj denove de 1981 ĝis 2000 pre-
zidanto de Kristana Esperantista Ligo
Internacia. La venontan dekan de apri-
lo li estus atinginta sian sepdek-kvinan
jaraĝon.

Adolf BURKHARDT naskiĝis en 1929
en Germanio. Li eklernis Esperanton
en 1947 per koresponda kurso; par-
topreninte en la universala kongre-
so en Haarlem en 1954, li definitive
esperantistiĝis. Li tre aktivis ankaŭ en
Germana Esperanto-Asocio, precipe
prizorgante la bibliotekon: la nuna Ger-
mana Esperanto-Biblioteko en Aalen
estis sub lia direktorado. En 1992 li rice-
vis la Merito-krucon de Federacia Ger-
manio pro sia ekumena laboro per kaj
por Esperanto. Li estis prezidanto de la
ekumena komisiono de KELI kaj IKUE
kaj honora membro de UEA.

Verŝajne la plej impona laboro kiun
li realigis koncernas la eldonojn kaj tra-
dukojn. Li estis kuneldoninto de „Ad-
oru Kantante” kaj eldoninto de „Tero
kaj Ĉielo Kantu”. La krono de tiu labo-
ro estas Adoru, granda kristana kantli-
bro eldonita en 2001, kiun li tre riĉigis
per siaj tradukoj kaj pliaj laboroj. Pro tiu
verko kaj lia verkaro ĝenerale li ricevis,
kune kun la aliaj du aŭtoroj, la esperan-

tistaj pastroj EICKHORN kaj KRONEN-
BERGER, la Esperanto-kulturpremio
de la FAME-fondaĵo.

Ekumenismo estis en lia koro, kaj
li multe strebis por la dialogo kaj ren-
konto de la kristanaj esperantistoj: dek
ses ekumenaj kongresoj ekde 1968 estis
grave influitaj de lia senlaca strebado
„por ke ĉiuj estu unu”. Lia lasta publika
apero okazis la pasintan dek sepan de
januaro, kiam dum ceremonio en We-
ilheim/Teck, suda Germanio oni liveris
al li fest-libron titolitan „Esperante kaj
Ekumene” en la jaro de lia sepdek-kvin-
jariĝo. Adolf BURKHARDT, jam malforti-
gita de sia grava malsano, cerba tumo-
ro, estis festata de ĉirkaŭ 150 personoj,
inter familianoj, esperantistaj geami-
koj, kaj multaj homoj el liaj antaŭaj pa-
rokoj. Ondo da estimo kaj amo kiu ne
ĉesis ankaŭ dum la lastaj semajnoj de
suferado, kiam la kristanaj esperantistoj
ĉirkaŭis familion Burkhardt per multaj
elmontroj de proksimeco, preĝado, spi-
rita subteno.

Adolf laboris dum jardekoj por antaŭ-
enigi Esperanton en la eklezio, por prez-
enti la kredon al esperantistoj kaj por la
kristana ekumenismo. Kaj tion li ĉiam
faris per la granda ĝojo kiu disradiis el
lia persono.



JAAP VAN DIJK


Ni ĉiuj jam dum pluraj jaroj vivadis kun la malĝoja certeco, ke la afabla, helpema kaj bonkora edzo de nia kara KELI-sekretario Els VAN DIJK, estas grave malsana, finfine nekuracebla.

La 30an de marto atingis nin la definitiva sciigo, ke la ĉielo vokis lin hejmen. Ni bone komprenas, ke tio estas forta bato por Els, kiu tiom longe kaj tiom amoplene lin — survoje al la postviva patrujo — prizorgis. Ŝi vidis kiel li, nur nun sesdekjara, sopiris vivi sed devis akcepti multe da suferoj, sciante ke ĉiu batalado nepre estos vana kaj jam anticipe perdita. Precipe la lastaj semajnoj estis ege pezaj kaj lacigaj por Els, sed ŝi ĉiel spertis tantajn korojn kaj helpantajn manojn, nelaste de ŝia filino Ingeborg kaj ŝia bopilo Ziko.

En nia memoro postvivis Jaap kiel fidela kaj helpopreta amiko, kiu, ekzemple dum Esperanto-aranĝoj, ĉiel kaj ade servis al kongresanoj. En mia menso fiksiĝis ankaŭ la bildo de Jaap, kiam li dum kelikongresa teatraĵeto ludis la rolon de D-ro ZAMENHOF. Enirinte la scenejon, li faris tion tiel inde kaj respektu, ke la tuta salono en la sama mo-

mento unuvoĉe elkriis: „Rigardu, kiom frapante li similas!” Mi estas tute certa, ke ĉiuj KELI-anoj ĉiam ĝojis lin renkonti dum niaj ĉiujaraj konferencoj.

La 6an de aprilo okazis la kremacio. Tre bela kaj varma estis la adiaŭa liturgio, kies tekstojn kaj kantojn elektis Jaap dum lin vizitadis la pastoro, kun kiu li pli ofte parolis pri siaj kredo, du-



boj kaj espero. Rilate al la jeso aŭ neo de postmorta vivo min frapis trafa elparolo lia: „Vi ja scias, ke mi ege ŝatas surpriziĝi!”. La kernon de la diservo estigis psalmo 19 kaj 1 Kor. 13. Laŭ peto de Jaap korduŝe pianludis Ingeborg. Tre multaj homoj ĉeestis, el kiuj pluraj parolis pri siaj spertoj kaj kontaktoj kun la mortinto,

unuavice el lia kolegaro. La Esperantomovado, ankaŭ KUNE kaj KELI, estis bone reprezentita.

Ke la ĉielo donu al Jaap VAN DIJK ripozon kaj la bona Dio ‘surprizu’ lin per eterna paco kaj klara lumo. Al Els, Ingeborg kaj Ziko, al ĉiuj geparencoj, la amikaro kaj la tuta kunsuferanta KELI-familio, nia Patro donacu forton kaj paciencon por akcepti la forpason de kara homo!

Jacques TUINDER

LA KELI-FAMILIO PERDIS SIAN 'PATRON'

En prefaco dum funebra liturgio la Eklezio kantigas la pastron, ke al mortintaj fideluloj la morto ne forprenas sed (nur) aliigas la vivon (*vita mutatur, non tollitur*); same kiel malantaŭ la horizonto de la portempa vivo la iama tera loĝejo metamorfozos en eternan restadejon.

Nu, rilate al nia kara membro, multjara prezidanto de la KELI-familio, estas tre malfacile kredi kaj akcepti tiujn profundajn vortojn. Grete, la tuta familio BURKHARDT, amikaro, konatoj kaj esperantistoj spertis kaj aŭdis, ke la Morto iom post iom forprenis ilian kaj nian karan Adolfin! *Mutatur?* Jes, la terura malsano kiu senkompate atakis kaj profunde suferigis lin, rezultigis ke komence la korpo kaj poste ankaŭ la psiko ade kaj ade reduktiĝis, aliĝis kaj laste perdis siajn funkciojn kaj taskojn.

Ni jam longe sciis, ke la karan KELI-patron — ĉar tia li ja estis kaj restis dum longaj jaroj! — turmentis malboncelanta tumor. Li devis iri longan vojon laŭlonge de hospitaloj, specialistoj, terapioj kaj medikamentoj. Vojo de espero kaj timo. Sed granda konsolo estis, ke tiom da homoj amoplene ĉirkaŭis lian malsanulan liton. Fizike aŭ spirite. Proksime aŭ fore. Parence, amike, najbare, samideane. Helpante, kuraĝigante, konsolante, preĝante kaj (kun)kantante. ADORU estis fonto de alĉielaj linioj kaj kontaktoj. La zorge kompilita kaj ĝustatempe ofertita Feslibro honore al la baldaŭa 75-jaraĝigo (10.4.2004), jen — unu el la kulminoj de la lasta vivoperiodo!

Mi tre dankas, ke mi konatiĝis kaj amikis kun frato Adolf kaj ke la KELI-familio konfidis al mi la prezidantecon, kiun taskon li tiel longe, konsciencie, saĝe kaj energie plenumis. Mankas al mi la vortoj por diri ĉion kion nun flustras la koro. Mi diru, ke dum la solena entombigo kaj diserva ceremonio plene ekumena — estis ja Sankta Ĵaŭdo! — mi spertis samtempe sentojn de malĝojo kaj ĝojo. Tiom da homoj ĉeestis. Tiom da varmaj vortoj de danko kaj laŭdo kaj admiro kaj amo kaj estimo direktiĝis al Grete kaj ŝiaj infanoj kun familio, kaj al ĉiuj ĉeestantoj!

Dum la celebrazo kaj la postsolena kunestado iom post iom kompletigis bildon de granda kaj unika homo, kiu ludis gravan rolon en la vivo de sennombraj kunhomoj sur multaj kampoj. Sed antaŭ ĉio ĉiu pentris lin kristano kaj ĝisosta, konvinkita esperantisto!

Unu el la parolintoj citis el letero de praeklezia verkisto, kiam li skribis pri la morto de amiko. „Ni ne perdis bonan amikon, sed sendis lin antaŭen!” Nu, KELI-anoj — sed tio postulas montojn movantan kredon — ni klopodu konsideri la forpason de Adolf ne perdo sed kiel nova ‘misio’ al li, nome por inspiri kaj gvidi nian kristanan Esperantomovadon de el la ĉielo. Sur la apudtombeja memorfloraĵo, donacita de KELI, oni povis legi la tekston: „*Mi ne mortos, sed vivos. Kaj mi rakontos la farojn de la Eternulo*” (Psalm 118:17). Jen la ekzistoraĵo de nia Ligo: internacilingve rakonti la farojn de Dio, kiu deziras ke ni respektu unu la alian, interfratiĝu kaj

unuigu. Adolf postlasis bonan ekzemplon. Ke la ĉielo lin rekomencu per sia eterna paco kaj konsolu ĉiujn liajn gekarulojn per lumo kaj forto!

Jacques TUINDER,
prezidanto de KELI

En la nomo de KELI nia prezidanto — fine de la ekumena diservo en la bela preĝejo, dediĉita al sankta Petro — petis permeson al Grete kaj familio Burkhardt direkti sin al 'nia amata frato Adolf'.

Finfine venis la malĝoja horo, en kiu vi definitive forlasis nin. Kaj por ni ĉiuj la adiaŭa disiĝo estas peza kaj dolora. Ni, tamen, devas respekti kaj akcepti la vojojn de la ĉielo kiuj por ni estas kaŝitaj kaj neklariĝeblaj. Forvojaĝis el nia mezo homo bonkora, afabla, zorgema, inspira, talenta, laboréma, ekumena. Kara edzo, patro, bopatro, avo, parenco, amiko, frato, KELI-ano.

Mi parolas al vi kiel prezidanto de KELI, tiu malgranda, mirakla familio, kies membroj loĝas dise sed kiujn kunligas unu Sinjoro, unu Evangelio, unu lingvo kaj unu misio. Ĝin mi ĉi tie reprezentas.

Adolf, mi ekkonis vin en 1966, kiam mi fariĝis prezidanto de IKUE. La tiamajn tagojn karakterizis forta ekumena strebado kaj sincera reŭnuiĝemo kiel tuja reeĥo de la dua Vatikana Konsilio. Kune kun Stefan MAUL, redaktoro de 'Espero Katolika', ni triope preparis kaj realigis la unuan kongreson de esperantistoj el pluraj eklezioj kaj diversaj kristanaj tradicioj. Temis pri la leĝenda Komuna Kongreso okazinta en 1968 en Limburg/Lahn. Antaŭ la okuloj de mia menso nun ŝvebas la bildo de du prezidantoj harmonie kunlaborantaj kaj revantaj pri 'gefianciĝo' kaj poste eĉ 'geedziĝo' de IKUE kaj KELI. La historio instruis al ni, ke la vojo evidentiĝis longa kaj ŝtonoplana. Neniu

scias kiam la tempo estos matura. Nu, certe vi akre observos kaj atenté sekvos la evoluon de el via enĉiela ora seĝo!

Kiel nuna KELI-prezidanto mi deziras paroli al vi vortojn de profunda respekto kaj granda danko. Vi mem forlasis vian Grete, viajn infanojn, ĉiujn viajn gekarulojn kaj nian KELI-familion, sed vi postlasis al ni almenaŭ tri juvelajn monumentojn, kiujn mi tuŝu ĉi tie papilie.

La unua monumento estas via ĉiutaga vivpraktiko, via promenado surtera, Ĝin ni kunportos en niaj koroj. La duan monumenton mi resumu via predikado kaj via verkado. Ĝi estas tre altvalora trezoro kaj kiel tia trovos daŭran loĝejon en niaj oreloj. La tria monumento aperas antaŭ ni kiel tre konkreta, fortika, bindita, preskaŭ eternigita, palpebla per la manoj kaj videbla per la okuloj. Ni nomu ĝin via finfina, tute elskribita vivotestamento, kiun vi ĉizis kaj skulpis kune kun ambaŭ viaj ĉi tieaj amikoj, pastro Bernhard EICHKORN kaj pastro Albrecht KRONENBERGER. Ĉiam kiam ni emas adori, ni aŭdos vian voĉon, vidos viajn svingantajn manojn, ĝuos vian kantantan koron kaj ridos pri la fonaj anekdotoj, kiujn vi kutimis rakonti ĉirkaŭ multaj kantoj. ADORU estas la plej lasta kaj plej grava monumento, kiun vi heredigis, kaj ni zorge kaj pie kaj dankoplene gardos ĝin en nia buŝo kaj sur niaj lipoj.

Adiaŭ, kara Adolf! Vi scias, ke nian KELI-familion trafis duobla frapo, ĉar ne nur Grete perdis sian amaton, sed ankaŭ Els, la sekretario, sian edzon Jaap.

Ke vi, karmemora frato, ripozu en paco kaj falu el la zorgemaj manoj de Grete en la bonajn manojn de nia ĉiela Patro. Li konsolu nin, kiuj malĝojaj kaj orfaj postrestas.

Jaap elektis por la funebra liturgio rondkantajn vortojn, kiujn vi, Adolf, tradukis en 2001:

Glaube, Hoffnung, Liebe bleibe...

Fid', esper' kaj amo restas.


Ĉio monda pasas for.

Sed eternas Di-Sinjoro'. Amen.

Sur la altaro brulas jam paska kandel, kiun mi faris por Grete. Ĝi indiku, ke Adolf jam eniris en la ĝojon de la releviĝinta Sinjoro. Tiu Sinjoro estu kun ni ĉiuj en ĉi tiu horo de adiaŭado. Amen.

Karaj estraranoj, Kore kaj sincere mi sendas al vi mian kondolencon! Ke la Bona Dio 'ilin' kaj 'nin' benu kaj konsolu! Gefrate viaj,

Vera kaj Jacques



Saluton Philippe,

Mia patro petis min sendi al vi (por DR) kelkajn liniojn por la plurvoĉa nekrologo pri Adolf BURKHARDT. Kaj mi aldonas kelkajn liniojn mem...

„En retrospekto, kio plej senpere aperas al la memoro el lia multifaceta personeco? La parollerto eĉ pri profundaj aferoj, la ĉiam amika gajeco, la vastanimeco tiom esenca al ekumenece homo — aŭ lia muzika talento?

Dum nia multjara konatuleco Adolf al mi kaj mia edzino Anna-Lisa restis pozitiva modelo de kristana esperantisto, riĉe dotita per ĝojo kaj amo. Ni havas nur helajn rememorojn, ĉu el kongresoj, ĉu el multaj okazaj vizitoj kun sia Grete al nia hejmo en Stockholm”.

Ake AHLRÉN

„Kiel filino de Ake kaj Anna-Lisa AHLRÉN, mi frue renkontis plurajn alilandajn esperantistojn — kaj inter ili Adolf BURKHARDT. Li tuj faris fortan impreson al mi: li tiel brile majstris la lingvon, li estis tiel sprita kaj varma persono. Kaj tiu frua impresoj restis kaj fortiĝis dum la jaroj. Kun ĝojo kaj dankemo mi memoroj varman kristanan amikon — kaj nekutime brilant esperantiston”.

Birgitta GUNNARSON

Raporto pri la Diservo okaze de la adiaŭo de Adolf BURKHARDT (+2.4.04)

Estimataj, karaj geamikoj de Adolf kaj Grete BURKHARDT,

je la lasta fojo mi volas elekti ĉi tiun formon de la raporto, ankoraŭ plena da impresoj de la hodiaŭa tago. Sur la tombejo travivis — dankeme certe ĉiuj estis pro la seka vetro — pastro Bernhard EICHKORN, Villingen (kuneldonanto de „Adoru” kaj redaktoro de la germanlingvo „Ekumena Esperanto-Forumo”) kaj pastoro Walter VEIL, Weilheim, kune kun granda komunumo kaj la trombonkoruso el de Adolf amata Bissingen, dignan, per bibliaj vortoj portitan entombigan ceremonion. Poste longa karavano iris en la urbon al la belega malfrugotika Petro-preĝejo kaj plenigis la tutan benkaron. La koruso jam estis ekzercinta zorgeme sur la orgena galerio.

Okazis riĉa, vere ekumena Diservo — kun kantoj, kiujn Adolf BURKHARDT en la paso de multaj jaroj estis tradukintaj kaj kiuj nun trovis lokon en la ekumena kant- kaj preĝlibro „Adoru”. La alia kunverkinto, pastro Albrecht KRONENBERGER el Neustadt (Weinstrasse) kaj mi estis petitaj de la familio, gvidi la diservon. Kaj Ernst LEUZE, kiu ekleziumuzike konsilis la verkintojn, ludis la orgenon. Multaj spertis: Ni estas unueca en nia kredo kaj espero.

Ĉe la posta kunestado en la salono de la paroĉa domo estis ankoraŭ bona tempo por konversacio kun geamikoj, kiuj parte venis el malproksimaj regionoj. Eĉ Esperanto-reprezentatino el Zagrebo vojaĝis al Weilheim nur pro tiu ĉi adiaŭo. Belaj kaj personaj salutvortoj

kun multoblaj gajaj rememoroj trovis ĉi tie la ĝustan lokon. Malgraŭ la funebro pro la morto de Adolf BURKHARDT oni povis senti, ke la profunda dankemeco pri li estis en la antaŭo.

Ĉiuj, kiuj estis venintaj, karesis la familon kaj nin ĉiuj. Al ĉiuj, kiuj nur el la malproksimo povis pensi al ĉi tiu adiaŭa tago, estu salutoj des pli koraj kaj ili estu enigataj en la komunumo de la festantoj kaj esperantoj. Nian amikon kaj fraton Adolf BURKHARDT ni estas sciantaj en la kompateman manojn de Dio — kaj ankaŭ nin.

Kun koraj paskaj salutoj, eksplicite ankaŭ de Grete kaj ŝiaj infanoj, kiuj dankas pro la ekstreme impresa leteraro kaj ĝenerale por ĉiu akompanado, mi estas via

Walter GÖLZ
trad. Siegfried KRÜGER

P.S. Indikoj pri la esperantisteco de la ceremonioj aldonita de Siegfried KRÜGER:

Partoprenis ĉirkaŭ 30 esperantistoj. Dum la ceremonio en la halo de la tombejo la esperantistoj kantis gregoriane „En la paradizon vin eskortu la anĝeloj”. Ĉe la tombo ceremoniis ankaŭ Bernhard EICKKORN.

Post la germanlingva „Patro Nia” la esperantistoj ripetis ĝin en Esperanto. Apud la tombo staris florpelvo de KE-LI kun rubandaj surskriboj: „Kristana Esperantista Ligo Internacia (KE-LI)” kaj la de Grete elektita biblia vorto el psalmo 118 „*Mi ne mortas, sed mi vivos, kaj mi rakontos la farojn de la Eternulo*”.

La kantonumeroj dum la Diservo estis anoncintaj por la germana kantlibro kaj por ADORU. Sole la esperanti-

stoj kantis la psalmon 23 „*Ja paŝtas min la Eternulo*”.

La Diservo estis ekumena kaj inkluzivis la Sanktan Manĝon. La prediko temis pri Luko 24:13–32, la disĉiploj survoje al Emaŭs.

La nekrologon por KELI faris ties prezidanto Jacques TUINDER, tradukis Siegfried KRÜGER. En la kunveno post la Diservo estis salutvortoj fare de Karl Heinz SCHAEFFER nome de UEA kaj nome de GEA por la Esperanto-biblioteko. Saluti la vicprezidentino de IKUE, Marija BELOSEVIĆ el Kroatio, tradukis Alois EDER.



Estimataj,

Ĝus aperis omaĝe al la forpasinta Pastoro Adolf BURKHARDT jena verketo:

In memoriam. Adolf Burkhardt (1929–2004). Schliengen: Edition Iltis 2004. 40 p. ISBN 3-932807-45-6; prezo: 5,- EUR inkl. afrankon.

La du-lingva (germana–Esperanto) libreto enhavas biografion de Adolf BURKHARDT kaj apreĉadon de lia vivo-verko. Serio da fotoj dokumentas lian vivo-vojon de la lulilo ĝis januaro 2004.

Vi povas mendi ĉe ni aŭ ĉe Pastro Bernhard Eichkorn
(b.eichkorn@t-online.de).

Kun sinceraj salutoj

EDITION ILTIS, La Saousse,
FR-84340 MALAUHCENE
tel./fakso: +33 (0)4 90 65 28 33
retpoŝto: Editioniltis@aol.com
Inhaber: I. Häupenthal —
Sitz: DE-79418 Schliengen.

Gerrit BERVELING

MARDO

(parto dua)

La juna Bok subite kolapsis ie sur la agro. Li tie estis kun la bovinoj, estis fine de aŭgusto, antaŭ nur kelkaj semajnoj. La knabo de l' najbaro lin tie trovis. Li agoniis, ŝajne. Sed kuraciston li malpermesis venigi. — Kostas tro, li diris. Kaj ankaŭ la patron tio ne helpis. Ni ankoraŭ ne elpagis la ŝuldojn. Lasu do, nur kuŝigu min ie, por ke trankvile mi rekonsciigu denove. Mi nur fartas iom malbone. Eble ĉi-matene mi misglutis, ne manĝis bone aŭ ne sufiĉe trinkis da lakto. Aŭ tro varmis la suno aŭ... — Sed ĉiuj ni konsciis, ke estas nuraj pretendoj, por provi kvietigi nin. Sed ni ne tiel facile estis trompeblaj. Ankaŭ ĉe lia patro ni ja vidis, kiel efemeraj estas ni homoj, ankaŭ la psalmoj tion ja diras: „ni estas kiel la herbo de la kampo, tie ni staras, pasas vento kaj nia loko ne plu rekonas nin...” La homo estas pasema. Tutan semajnon li deliris, foje mi volis tamen venigi kuraciston, sed li rimarkis la bruon de la pordo, sendis Antonon revoki min. Kaj mi devis promesi, ke neniam mi vokos kuraciston antaŭ ol li mem ĝin klare petos. Bone, mi do lasis la ideon. Poste, semajnfine, li havis tiom da doloro en la stomako, ke li vokis min ĉe si kaj diris: — Estas bone, mi nun scias ke venas la fino. Mi ne plu vivos longe. Ni ne fariĝos oldaj kune, mi bedaŭras... Mi supozas, mi scias, ke eble kvar aŭ kvin tagojn ankoraŭ... Mi... — Li haltis, singultis, mankis la spiro al li paroli plu. Li ne kutimis longe paroli. — Mi volas, ke ĉiujn vi voku nun al mi,

la patrinon, la infanojn, ĉiujn, ankaŭ la hundon vi voku. — Kaj tiel ni faris. Li estis tiuvespere tre klara, mense tre klara. Li diris: — Neniam mi kutimis diri grandajn vortojn, mi ne emas je tio. Sed pri unu afero vi estu certaj: Neniam mi permesas, ke venu al mia entombigo la pastoro. Mi ne volas, mi rekte rifuzas ke tiu venu preĝi ĉe mia tombo, tiu hipokritulo, tiu kanajlo, kiu insultis mian bonan patron. Mi ne eltenus, se tion li farus ankaŭ ĉe mi. Mi certigas al vi: Se venos li prediki ĉe mia tombo — mi rifuzos entombiĝi! Tiam mi ne scias kion mi faros, sed ion mi faros: Dio tion scias! — Ni ĉiuj ege timiĝis. Ni ja konis lin, ni sciis, ke li ne mokas nin. La juna Bok petis iom trinki, brando aŭ ion alian fortikan. Tion kutime li nur faris je festotagoj. Li levis la glason al ni, kun larmino okulangle, tostis al ni, diris: — Mi ne volas forlasi vin, estas tiu damna malsano, mia korpo ne plu eltenas, mi devas iri. Ne estas alie. Sed estas bone, mi ja ne povas plu. Morgaŭ kuraciston vi povas venigi. Sed nepre ne elportu min el ĉi nia dometo antaŭ mia morto, kion ajn diros la kuracisto. Al tia moderna malsanulejo mi rifuzas iri. Kaj nepre ne la pastoron...

Tio estas liaj lastaj klaraj vortoj. La postan tagon la kuracisto, kiun ni alvenigis, ordonis ke oni tuj transportu lin al Roterdamo, ĉar tie estas la plej moderna hospitalo, kie eble oni ankoraŭ povos operacii lin... Sed Bok ja diris ke nur mortinta lin oni forportu el la domo, do

ni rifuzis, dirante, ripetante liajn proprajn vortojn. Ankaŭ lia patrino, kiun oni petis pri konsilo, — ankaŭ ŝi same obstine nur ripetadis liajn proprajn vortojn: nur mortinta... Fine la kuracisto delasis... cedis, foriris... Fakturon neniam li sendis. Estas bona homo, fidinda. Li scias nian financon staton. Li komprenis kial Bok dum la komenca tempo rifuzis vokigi lin... La enterigo de l' patro kostis plurajn milojn, kaj tio ankoraŭ ne estas plene pagita... La oldan ni ja devis dece enterigi, ĉu ne? Tial la diservon en la preĝejo ni petis, kaj veran ŝtonon sur la tombo, kun gravuraĵo — lia aĝo, datoj de naskiĝo kaj morto, *La Sinjoro estas mia Paŝtisto...*

Kaj nun mortis nia juna Bok. Neimageble. Du tiaj homoj, viroj, fortikaj, altstaturaj, ĉiam agemaj en la kampa laboro — subite falĉitaj unu post la alia, kvazaŭ de maligna satano. — Ne satano, kriis histerie la oldulino: Dio prenas rapide, kiun Li amas. Ĉi tero nia estas plago, plagejo, multsuferada, — Dio kompatas, kiun Li amas. — Lace ŝi singultetis, kurba en sia seĝo.

— Kaj kion vi deziras nun, ke mi faru? mi demandis, kvankam la respondon mi jam sciis.

— Ke vi prizorgu la enterigan diservon. Vi ne estas de ĉi tie, vi estas eksterulo, al vi ne gravas tiaj vilaĝaj kvereletoj aŭ ĵaluzoj, kiuj kaŝiĝas ĉie. Ni konfidas, ke vi ne estas tiel senkora, ke ankaŭ vi dirus, ke nun — dankinde! — Bok estas eninfere... — La vidvino rigardis al mi rekte en la vizaĝon, kun iom da larma brilado en la okuloj inter la okulharoj. — Kompreneble, mi respondis. Estas neinde, nehome, okaze de enterigo tradraŝi la homojn per tiaj ideoj, — estas malhumane. Krome,

kiun amas Dio, tiun Li amas. Kaj neniuj homoj ĉi-tere povas juĝi pri alies koro, fido aŭ sincero. Ni homoj, ni scias nenion pri infero aŭ ĉielo — postmorte. Tio ne estas nia tereno. Ni tion lasu al Dio. Ankaŭ Li estas, se diri sincere, por ni plene mistera. Ni povas fidi, ni povas certe kredi, — sed la homo ne havas Dion en sia poŝo. Kaj des malpli oni rajtas ĉe tombo malfermita blasfeme sakri alian homon, asertante ke li estas nepre kondamnita de Dio. Kia arogo! Kia blasfema diro! Kaj tion dirus viro, kiu sin nomas pastoro kristana!? Mi ne komprenas.

Ankoraŭ duonhoron ni plu parolis, pri nia indigno kaj nekomprenejo, pri la mortinto kaj ties patro, pri la stato de l' familio, nun minacata perdi sian grundon, ĉar kiu kapablos plu prilabori ĝin sufiĉe por daŭre pagi la rentumojn? La juna knabo ja estas vere multe tro juna, kaj la virinoj, kvankam peze laborantaj jam delonge, ne estis sufiĉe fortikaj muskole, por ĉi peza ekzisto...

Krom tio ni parolis pri la enteriga ceremonio mem. Ĝi okazos vendredon matene je la 11a, en la vilaĝo. Kaj antaŭ ĝi mi gvidos diservon en la kapelo de l' tombejo. Tiu loko estas pli malpli neŭtrala; en la loka preĝejo la pastoro ja ne permesus al mi eĉ paroli... Kiel gvidotekston ni prenis: Dio estas amo...

Reirante en la aŭto mi multe remaĉis. Ĉu mi diris la bonajn vortojn? Ĉu mia kolero kontraŭ mia ortodoksa „kolego” estis reale sincera? Kaj kion fakte vendredon mi diru? Ja tre povas esti — estas ja vilaĝeto, kie ĉiu ĉiun konas —, ke venos al la ceremonio la duona vilaĝanaro.

Preterante certan digon, subite mi memoris ke tie loĝas sinjorino, pri kies

farto jam plurajn semajnojn mi nenion plu aŭdis. Lastafoje ŝi estis ĵus denove hejme, reveninte el plurmonata restado en malsanulejo, sed tute ne estis klare, ankaŭ ne al ŝi mem, ĉu la prizorgintaj kuracistoj konsideras ŝin sanigita aŭ ĉu nur ne plu kuracebla. — Mi tien iru, ne por vera vizito, por tio nun mankas la tempo, sed eble preterpase mi povas saluti ŝin, iom informiĝi kaj eventuale fiksi, kiam denove mi venu...

Pensite — farite. Sed mi ne trafis ŝin hejme. La servisto en la stalo informis min, ke la mastrino fartas relative bone kaj ke nun ŝi estas for rajdante sur Bles, la preferata ĉevalo.

Kiam mi hejmenvenis, unue mi iom manĝis. Estis pli malfrue ol kutime por tagmanĝi, sed ĉar mi ja manĝas sola, tio ne tiom gravas. Unu smirpanon mi prenis. Sufiĉas. Kaj gluteton da lakto.

Posttagmeze mi legis dikan raporton pri intereklezia diskutado rilate la reciprokan partoprenon kaj kuncelebradon de la Sinjormanĝo³. Komisiono el la romkatolika kaj pluraj aliaj eklezioj dum ses jaroj pristudis la respektivajn liturgiojn por konstati el ties vortigoj, kion fakte do kredas tiuterene la koncernaj eklezioj, kaj ĉu surbaze de ties konstato eventuale eblos difini gvidliniojn por estonta agado. La reprezentantoj de l' luteranoj, kaj de la du ĉefaj kalvinanaj eklezioj nialande (la reformita kaj la nederland-reformacia), ku-

ne kun la katolikoj diskutadis ĝisfine; la menonitoj kaj remonstrantoj jam post unu jaro retiris sian reprezentanton de la projekto, ĉar ili konsideris la tuton ne senchava: malŝparo de tempo kaj energio. Krome ili ne havas fiksitajn liturgiojn, do tute ne eblas enmeti iliajn tradiciojn sammaniere kaj samrange kun la ceteraj. La plimulto de la ceteraj eklezioj de Nederlando rifuzis eĉ ekdiskuti pri la temo, kiel kutime...

La raporton mi ne sukcesis ellegi ĝisfine en unu posttagmezo; estis pli ol 150 paĝoj. Sed almenaŭ sufiĉe bone mi vidis, kian metodon ili sekvis, kaj kiajn — ho mizeraĉajn! — konkludojn ili atingis: En la nuna stato de la Ekumena Movado estas nepre neniel defendebla, se la diversaj eklezioj jam nun akceptus reciproke, ke membroj de unu eklezio senpere partoprenu en la celebrado de l' Sinjormanĝo en alia eklezio. Kelkaj diras, ke ĝuste en tiu celebrado ni kristanoj festas ke ni estas unu en Kristo; — Ne, replikas aliaj: Ni nur memoras — kaj re-ĉeestigas — la morto-oferon de Kristo. Temas pri pano kaj vino. Jes ja, sed kiaj pano kaj vino? Dumdiserve ili ekhavas „simbolan ŝarĝon”, diras unuj; ne, asertas aliaj: ili reale ontologie fariĝas la „Korpo kaj la Sango de nia Savanto”. „Viaj pastoroj ne estas veraj pastroj, ĉar ili ne staras en la Apostola Tradicio seninterrompa”; „via celebrado estas kvazaŭ nura magiaĵo”... reagoj, reagoj... ktp ktp ktp ktp ktp...

Mi legis diligente, ja estas mia devo. Libervole tiajn raportojn neniam mi legus. Sed kiam mi iros al la kunveno en Eindhoven, lundon venontan, mi ja devos esti bone preparita por egalforte diskuti tie kun la sinodaj prezidantoj, la episkopo kaj la vikario...

³ Sinjormanĝo — disdonado de pano kaj vino dum la diservo, memore la vivon kaj morton de Jesuo. La romkatolikoj parolas pri *Eŭharistio*; en protestanta medio tradicie oni diras la *Sankta Vespermanĝo*.

Poste mi devis prepari la vespermanĝon. Ĉar mi loĝas ĉi tie kun ambaŭ niaj infanetoj, trioje ni mastrumas. Kelkfoje ili kuiras por la vespermanĝo; plej ofte tion faras mi. La servicon ni lavas laŭ pli malpli kaprica alternado. Mia edzino havas plenan laborpostenon en alia provinco, je longa distanco; ŝi do tie luis propran dometon, kaj prizorgas sin mem, fakte certasence ŝi vivas fraŭle, en mastrumado unupersona. Kompreneble ĉi tiu nia aranĝo ne estas vere kutima, sed en niaj specifaj cirkonstancoj tion ĉi ni trovis plej oportuna solvo. Ĉiutage ni havas kontakton. Por tio ja ekzistas la telefono, ĉu ne? Kaj ĉar nun ni estas devigitaj pli sisteme plani niajn semajnfinojn (ĉar ĉi situacio ekzistas nur ekde du jaroj; antaŭe ni loĝis kvarope en unu domo; sed tiam mi laboris en alia regiono ol nuntempe), — ĉar nun ni devas plani precipe la semajnfinojn, ni konstateble renkontas nin pli ofte ol antaŭe: por eksteruloj eble sonas iom strange, sed antaŭe, kiam ni loĝis ankoraŭ samdome, en Vlaardingen, kaj mi havis la laboron tute dise sur diversaj insuloj kaj samtempe ankaŭ multe pli norde, apude al Hago kaj Leiden, tiam la tutan semajnon mi tien reen veturis aŭte por atingi la diversajn homojn kaj grupojn, kiujn mi devis ĉeesti; mia edzino samtempe plentage laboris en Zoetermeer; do por ĝustatempe atingi sian laboron, jam frue matene ŝi ellitiĝis, kaj duonvekiĝante mi eble grumblis al ŝi ion kiel „salut’”, sed vere rimarki ke ŝi foriras... nu, tio estis maloftaĵo tiutempe... dum male, kiam vespere post laboro farita mi hejmenvenis, laca, kun bezono je iom da kvieto antaŭ ol enlitiĝi, kutime ŝi delonge jam estis en la lito, ofte jam dormis... Sed en la nova aranĝo,

kiun nuntempe ni havas, kun niaj du hejmoj, kun nia disloĝanteco, ni nin vidas multe pli serioze kaj eĉ laŭ horoj pli longdaŭre ol anticipe. Ĉar almenaŭ semajnfinojn ni nun intence planas anticipe... Kiuj kunloĝas, tiuj ofte forĝas *plani* la semajnfinojn... kaj ofte povis okazi, ke unu estis for tiutage, dum la alia tion ne atendis...

Do la vespermanĝon mi preparis. Ne, ke ni manĝos kune, ĉi-vespere. Ambaŭ ja estas al gimnastikklubo; ili manĝos pli poste, sed tiam mi jam estos for denove. Almenaŭ estos preta por ili la manĝo.

Vespere mi iris al najbara strato, bicikle. Estas granda avantaĝo de la nuna laboro, ke la plimulton de miaj vizitoj kaj kunvenoj mi povas plenumi sen uzo de aŭtomobilo. La liturgia komisiono kunvenas ĉi-semajne. Tio okazas ne tiom ofte, eble unufoje ĉiun kvinan semajnon. Se necese, ni kunvenas pli ofte. Wim jam ĉeestas, same kiel Annie, dum la hodiaŭa gastiganto — Peter — preparas la trinkaĵon. Kvaronon antaŭ la oka ni komencas, kun antaŭ ni taso da kafo aŭ teo, laŭguste. Ni estas sesopo. Mankas neni. Kvankam ja estas nur septembro, ni jam larĝe priparolas la diservan maratonon ĉirkaŭ Kristnasko: ekumena kantado de kristnaskokantoj, organizota kune kun reformacia kaj romkatolika paroĥoj; la propraj adventkunvenoj, kaj la festaj diservoj je l’ kristnaskaj vespero kaj mateno mem. La ĥoro ja devas sufiĉe longe antaŭe scii, kiujn kantojn de ĝi ni atendas ĉi-foje. Por tia evento ili ja ĉiujare ellernas ion tute novan. Foje de Händel, de Bach aŭ simile, foje ion tute modernastilan. Krome ĉiujare estas kelkaj plendetoj, deposte — post la festado kristnaska, ke fak-

te ni ja kantas kun plezuro, ke vere gaje ni kantas dum la diservoj, sed ke tamen... kiel diri... fakte multe da tekstoj kantitaj... estas tiom fremdaj al la nuna vivo, al nia nuna mondperceptado... ke, nu ili ofte estas tiom arkaikaj, tiom tradicie ortodoksaj... nu, sinjoro pastoro, ĉu vere ne eblas trovi pli bonajn, pli nun-tempajn kantotekstojn? — Disvolviĝas longa priparolado pri la plej diversaj konataj kristnaskokantoj: tiu sonas ja tiel gaje, tra tra la la la la la la la — tiun sonon oni ege malvolonte cedus, sed ho ve! Ĉi teksto! Tiel aĉa, ion tian ja neni ŝi trovas plu povas eldiri serioze, ĉu ne? Aliflanke, Wim konstatas, ke kantante en preĝejo oni ja povas elvoĉi multe pli da aferoj, ol oni povus seriozate eldiri en simpla prozo, sen kanta akompano... Kantante oni kvazaŭ elleviĝas super si mem. Trees proponas, ke oni kompilu liston de tiaj kantoj, kies sono, kies melodia riĉo ravas ankoraŭ post tiom da generacioj, sed kies teksto taŭgas nur por la rubujo de l’ forgeso. — Estas ja amaso da tiaj en nia *Kantlibro por la Eklezioj*, kiel nomiĝas la intereklezia kantararo Nederlanda el 1973. Simpla rubaĵo, sed tian balaston la ortodoksaj ankoraŭ ŝatas kanti plenpulme, rikanas Eric. — Ho ne, protestas alia: La vere ortodoksaj eĉ ne tuŝas tiun *Kantlibro*. Por tiuj ĝi estas tro frivola. La ortodoksaj kantas nur la psalmojn, kaj tiujn nur en la rimigo de l’ 17-a jc. Ne la novan! kaj des malpli tiujn „homfaritajn” kantojn el la *Kantlibro*...! Sed kompili tian liston, ja kial ne? Bonega ideo! Supozeble ĝi iĝos longa. — Kaj, intermetas la gastiganto, Peter: Kaj se nian listigon ni faras, por kio ĝi taŭgu? Ja venas Kristnasko pli baldaŭ ol nun ni konscias. Ni ne havas

monatojn por senhaste pripensadi, pesadi, kiun tekston kanti laŭ kiuj melodioj. Ni bezonas novajn tekstojn, se tion ni vere volas kribri — kaj ja ege rapide. La ĥoro komencos provkanti jam post du semajnoj, maksimume. Nia ĥoro ja ne estas profesiuloj, ĉu? — Do, jen la demando: kiu kapablas verki haste novajn tekstojn, kiuj ritme tiel fluas ke ili estas bone kanteblaj? — La pastoro kompreneble devas verki kelkajn, li scias rimi, kaj krome li scias, kion kredas nuntempuloj, ĉu ne? Li do ne enigis tiajn stultaĵojn... — Mi konas sinjoron en nia paroĥo, kiu foje gajnis premion pri poezia rubriko en loka gazeto. Ĉu mi petu lin, ĉu ankaŭ li volas verki tekston? rimarkigis Annie, kiu longan tempon estis sidinta nur aŭskultante.


Kiu observus ŝin, tiu eble povus miskompreni ke ŝi nur sidas tie. Sed ĉion ŝi observas, kutime. — Estas bona ideo, mi komentis. Ni ĉiuj serĉu, ĉu ni povas trovi homojn, kiuj pretas verki tekstojn, sed por eviti seniluziojn, anticipe ni ĉiam avertu, ke temas nur pri provo: antaŭ ol la novajn tekstojn ni vere akceptos por niaj diservoj, unue ni priparolu ilin, enhave kaj laŭ la formo: ĉu vere ili vortigas tion, kio estas nia nuna fido, ĉu vere ili estas sufiĉe nuntempaj, rekoneblaj... Do oni ne supozu, ke kion ajn oni verkus, ke tion nepre ni kantos... Kvankam, se la homoj estas sinceraj pri sia fido, mi kredas, ke jam baldaŭ ni tion povos rekoni en la tekstoj — kaj tre verŝajne la plimulton ni povos freŝe kanti kristnaske. — Sed unue urĝas kolekti, kompili la ŝatatajn melodiojn...

Oni nomis kelkdek da tiaj. Mi ilin notis. Vere, precipe el Mezepoko devenas multege da melodioj, kiuj tiom

SANKTA BIRGITTA

Oni ne komprenas Birgittan, se oni ne scias, ke ŝi apartenis al kaj estis markita de la sveda sinjora klaso, kiu jam sub la reĝo Magnus LADULÅS formiĝis edukita monda nobelaro.

Ankaŭ sen tiu mondkonata filino la provinca juĝisto Birger PERSSON en Finsta, Uppland, ne povus esti konita de la posteularo. Li estis dum multaj jardekoj unu el la gvidantaj viroj de Svedio. La patro de Birgitta estis forte religia viro de malnova temperamento.



ĉiele belas, ke supozeble ĉiu generacio ilin denove povos kanti kun juneca ardo kaj amo.

Poste ni pritraktis mallonge kelkajn etajn detalojn de la sezonkomenca diservo. Sed tio estis ĉio por hodiaŭ. Estis senproblema, simpla, nekutime mallonga kunveno. La pli posta, en oktobro, estos pli plenŝtopita de taskoj solvotaj. — Ankoraŭ duonan horon kun glaseto da limonado aŭ vino, ni plu babilis en agrabla etoso.

Estis ĉirkaŭ la dekunua vespere, kiam mi hejmenvenis. Post ol interŝanĝi la ŝuojn je pantofloj, mi kviete malstreĉe ankoraŭ ĝue legis duonhoron en libro kun belega poezio de amata Brita poetino...

Gerrit BERVELING

La tuta parenkarco en fora pasinteco estis juĝistoj. Li donis grandajn donacojn al piaj institucioj, mem li estis grandege riĉa. La patrino devenis de la fame konata nacia reĝa dinastio kaj estis parenca al la reĝa domo.

Birgitta naskiĝis dum la printempo 1303. La patrino de Birgitta mortis en 1314, do Birgitta nur dum 11 jaroj konis kaj vivis kune kun sia patrino. Ŝi estis severa, pia kaj altranga virino. Kiam la patrino de Birgitta akcidente falis en la lagon — ŝi tiam estis graveda — la duko Erik troviĝis en la apudeco kaj savis ŝin. La gepatroj de Birgitta estis entombigitaj en la katedralo de Uppsala.

Post la morto de la patrino de Birgitta, la patro translokiĝis ŝin al la bona domo de Aspanäs, apud la lago Sommen, kie lia bofrato kaj kolego de provinca leĝisto Knut JONSSON loĝis. Kiam Birgitta venis al Aspanäs, ŝia onklo funkciis kiel kanceliero de la reĝo.

Iufoje la patrinflanka onklino dum la nokto iris en la ĉambron de la knabinoj kaj tiam trovis Birgittan surgenue je la lito kun larmantaj okuloj preĝantan. De tiu horo la onklino komencis kompreni, kia neordinara knabino ŝi ricevis en la domo — ŝi lernis ami kaj respekti ŝin.

De Aspanäs Birgitta translokiĝis al Ulfåsa pro la geedziĝo kun la dekokjara Ulf GUDMARSSON. Ulfåsa iutempe apartenis al la patro de Birger JARL.

Katarina, filino de Birgitta, rakontas kion ŝi aŭdis de sia patrino, ke ŝi plej volonte deziris vivi kiel virgulino kaj ser-

vi Dion sen edziniĝo.

Birgitta ricevis kun sia edzo 8 geinfanojn. Du filoj frue mortis. Katarina estis konfidita al abatino en monaĥejo por iĝi edukita en bonaj moroj. Katarina edziniĝis, kio povas esti surprizige, kiam oni konas ŝian grandiozan evoluadon kiel la heredantino de Birgitta. La filo Birger iĝis leĝisto kiel sia patro. Li estis pia viro, kiu sekvis Birgittajn en ŝia pilgrimado al Jerusalemo kaj ankaŭ kune kun la fratino Katarina transportis la kadavron laŭ la longa vojo al Svedio. La problema infano estis la plej maljuna filo, Karl, kiu protestis kaj ridindigis la pian vivon de la patrino kaj de la gefratoj.

Birgitta skribas en siaj rakontoj pri la apostolo Petro, ke li havis edzinon, sed kiam li vidis, ke la geedzeco ne povis harmonii kun la ofico de pastro, li disiĝis de tiu permesata geedziĝo por sekvi Jesuon.

Ulf rapide avancis, en la unua vico pro parencaj kontaktoj.

En 1339 li estis membro de la konsilantaro de la reĝo Magnus ERIKSSON. En kunligo kun liaj pli intimaj rilatoj kun la reĝo ankaŭ Birgitta povis deĵori kiel ĉefo de ceremonioj ĉe la kortego.

Nobla virino, kiu iĝis la bopatrino de Karl, la filo de Birgitta, Ingeborg ERIKSDOTTER, rakontis, ke ŝi aŭdis pri la severa kaj pia vivo en Ulfåsa. Ŝi konstatis, ke Birgitta dediĉis grandan parton de sia vivo al malsanulejo, kiun ŝi fondis en la bona kaj ke ŝi persone flegis la malsanajn homojn kaj ne fortiriĝis de mallogaj malsanoj kaj flegistinaj taskoj. Tio kondukis al tia admiro kaj amikeco, ke ŝi sekvis Birgittan al Romo kaj restis tie kvin jarojn. Birgitta ankaŭ serĉis la defalintajn knabinojn en iliaj bordeloj

kaj sukcesis per admonoj kaj persvadoj igi ilin sekvi al Ulfåsa, kie ŝi lasis ilin loĝi en aparta gastejo.

La edzo de Birgitta farmis la grandegan nacian reĝan dinastio-palacon en Vadstena, la plej grandioza ekster Stockholm, kiu poste devus enteni la monaĥinejon. Birgitta estis fieraj kaj potenca kastela virino, kiu donis ordonojn al granda stabo de geservistoj. Birgitta estis ĉirkaŭita de leĝistoj kaj reĝaj konsilistoj.

Pilgrimvojaĝoj

Birgitta iris piede en 1339 dum 30 tagoj de Ulfåsa al Trondheim. Ŝi povus rajdi, sed preferis piediri. Noblaj gesinjoroj kiel Birgitta kaj ŝia edzo ne veturis solaj. Ili havis geservantojn. Pastro kunsekvis.

Ili ankaŭ faris pilgriman veturadon al la tombo de Sankta Jakobo en Kompostelo en la nordokcidenta Hispanio en 1342. Ulf mortis en 1346 en la monaĥejo de Alvastra, sude de Vadstena.

La forpaso de la edzo

Ni nenion scias pri la malsano de Ulf. Li estis ŝanĝita kaj profundigis dum siaj lastaj vivjaroj, verŝajne sub fortaj impresoj de sia edzino.

La filino Katarina rakontas, ke estis la intenco ne nur iri en monaĥejon sed mem konstrui novan monaĥejon. La morto malhelpis la patron plenumi sian promeson.

Birgitta kaj ŝia edzo estis ege riĉaj. La infanoj ricevis laŭ la leĝo siajn porciojn da heredaĵoj. La plej maljuna filo instaligis en Ulfåsa. Iom post iom li iĝis kiel sia patro leĝisto en Närke. Birgitta havis multajn viziojn. Ŝi sciis, ke ŝi

estis elektita por ricevi ĉielajn mesaĝojn. Kiam ŝia Ulf mortis, ŝi fortiriĝis al filia konstruaĵo de la monaĥejo de Alvastra.

En la biografio de Birgitta, Katarina skribis, ke ŝi raviĝis en la spirito kaj vidis helan nubon kaj en ĝi viran aĉeraĵon, kiu diris: *Virino, aŭdu min! Mi estas via Dio, kiu volas paroli al vi. Ne timu, ĉar mi estas la Kreinto. Mi ne parolas kun vi por vi sed por la savo de aliaj homoj.*

Kiam ŝi ricevis sian definitivan revelacion fondi novan monaĥejon, io okazis, kio certe surprizis ŝin, kvankam ŝi fidele kredis je sia alvokiĝo. Magnus donacis sian reĝan kastelon Vadstena al ŝia estonta monaĥeja institucio. Li scias, ke ŝi ricevis sian revelacion en Vadstena, en la kapelo de la kastelo.

Troviĝas en nia tempo, la birgitan kavaliran ordenon, la kavalira ordeno de Sankta Birgitta, kies gvidanto estas grafo Vincenzo Abbate de Castello Orléans en Napolo. La ordeno havas pli ol 7.000 membrojn en ĉiuj mondpartoj, inter ili granda parto de potencaj katolikaj prelatoj, multaj ambasadoroj.

Birgitta kaj la monda politiko

Rimarkinda parto de nia eksterlanda komerco iris al aŭ trans Flandrujo. Stockholm estis hansa urbo kaj membro de la tiel nomata Bruĝo-kompanio. En Bruĝo, la sveda kupro trovis sian vendadon.

Birgitta supozis, ke ŝi povus prodenigi la papon kaj instigi la batalantajn reĝojn fari pacon.

Ŝi apartenis al politike gvidanta sfere kaj sociaj korifeoj. Ŝi estis sperta politikistino, kiu ekstere kaj interne konis la svedan reĝan paron kaj la reĝan politikon. Ŝi havis grandan intereson

pri justico. Svarmis la leĝistoj en la parencaro.

Ĉiuj estis konvinkitaj, ke Birgitta estis la proparolanto de Dio, ke ŝi ne parolis en sia propra nomo, sed en la nomo de Dio.

Birgitta kiel aŭtoro

La tiama tempo certe sufiĉe facile rekonis kiujn episkopojn Birgitta publike atakis — ofte ŝi aludis al aktualaj skandaloj kaj ekleziaj disputoj. Ŝi atakas kaj malkaŝas personojn, kiujn oni rigardas kiel perfidajn aŭ falsajn.

El ŝiaj meditadoj venis tuta libro, certagrade ŝia plej surpriza kaj rimarkinda libro, la tiel nomata „libro de la demandoj”. La tiama tempo bone aŭskultis al la priskriboj de Birgitta kaj notis ĉiun detalon de la sceno de torturado; oni rigardis ĝin kiel nova kaj bilda priskribo pri kriza momento de la homaro.

La vojaĝo al Romo

La sveda reĝo estis disĉiplo de Birgitta kaj ankaŭ parenco ŝia. Birgitta sciis, ke ŝi en Romo povos renkonti la papon kaj la imperiestron.

Birgitta forlasis Svedion por ĉiam. Krom la pastroj troviĝis en la vojaĝo Magnus PETRI, kiu ludis tre gravan rolon en la vivo de Birgitta. Li iĝis monaĥeja frato. Krom la nomitaj kunsekvis gesevlistoj.

Estis impona akompanantaro, kiu forlasis la regionon Östergötland kaj en agrabla kvietra rapideco vojaĝis en veturvagono aŭ rajdis pli suden.

En vizio estas skribite: *Kristo parolas al sia fianĉino, kiam ŝi estis en Alvastra kaj diris: Iru al Romo kaj restu tie, ĝis vi ekvidos la papon kaj la imperiestron, kaj parolu en la nomo de Dio al ili tiujn*

vortojn, kiujn mi diros al vi.

1350 estis jubilea jaro. Pilgrimantoj el la tuta Eŭropo alfluis al Romo. Birgitta ricevis loĝejon en palaco, kiu estis eĉ kunkonstruita kun la preĝejo Sankta Lorenzo de Damasko. La dezertigo de la pesto tuj antaŭ la alveno de Birgitta frapis la landon kun teruro. Ĉie la pesto estis rigardata kiel puno pro morala disfalado kaj dekadenco de la moro. Birgitta havis la saman opinion kiel la kuracistoj de la tempo kaj la klerikaro. La bildo de la lasta juĝo iĝas pli ĝenerala.

Kelkaj el la timigaĵoj de Birgitta estas evidente inspiritaj de la Biblio, precipe la Apokalipso.

En Milano Birgitta mokis la ĉefepiskopon. Verdire ŝi agis ne nur kuraĝe sed saĝe.

La unua tempo en Romo

La preĝejo troviĝis en mizera stato. Helpis malmulte, ke oni provis kovri la ruiniĝon per gobelinoj. Birgitta devis de la unua momento iĝi skuita de tiu stato, en kiu la ĉefa templo de la kristanaro renkontis ŝin. Baldaŭ ŝi ĉie en Romo povis vidi ekzemplojn de pli granda ruiniĝo. La sveda pilgrimanto privilegiĝis kun delikata domo. De sia dormĉambro ŝi povis vidi malsupren al la ĉefaltaro de la preĝejo Sankta Lorenzo de Damasko.

Birgitta nur pensis resti mallongan tempon en Romo. La papo estis atendata kaj ŝia komisiono kun la konfirmo de la monaĥeja regulo ne povos preni tro longan tempon, tiel evidente la Savanto sin esprimis. Birgitta kaj ŝiaj geamikoj tuj komencis viziti la sanktajn lokojn de la urbo.

La urbo Romo estis sovaĝejo. Neniu povis esti sekura; ĉie oni povis iĝi ata-

kita. Preskaŭ ĉiuj sanktaj lokoj kaj la preĝejoj kuŝis en ruinoj.

Unufoje Birgitta lasis la patrinon de Dio diri: *Romo estas kiel kultivata kampo, super kiu kreskis kardoj. Pro tio ĝi devas unue esti purigita per akra fero, poste per fajro kaj poste plugita de paro da bovoj. Mi faros kun vi kiel la kamparano, kiu translokas la plantaĵojn al alia loko. Ĉar al tiu ĉi urbo estos puno preparita, kiel se juĝisto povus diri: senhauĉigu la tutan haŭton, elprenu ĉiun sangon de la viando, tranĉu ĉian viandon en pecoj.*

Italaj konatuloj diris, ke apenaŭ troviĝas pli rimarkinda kaj pli sekura kristana prijuĝo de la katastrofa spirita situacio de Romo dum la foresto de la papoj. Okaze de la sensencaj internaj bataloj la papoj devis rifuĝi; la preĝejoj perdis siajn tegmentojn kaj pordojn kaj ŝanĝiĝis al necesejo por homoj kaj hundoj.

Birgitta enmiksas sin en la batalo pri la franciskanoj. La plej multaj nun havas proprajn, kion ilia regulo al ili ne permesas. Ili ĝojiĝas pli pri sia kondamninda propraĵo ol pri la sankta, glorinda malriĉeco, kiun la majstro Francisko rekomendis.

La patrino kaj la filino

La filino de Birgitta, Katarina, estis la kara infano. La frato Karl mokis ŝian ĉastan edzinigon kaj volis malebligi ŝian forveturon al Romo por rekuniĝi kun la patrino. Kiel la patrino ŝi iĝis frue edzinigita pro ordono de la patro. Neniu atentis ŝian revon pri monuĥeja vivo. Pro tio ŝi forlasis sian edzon por veturi al sia patrino en Italio. Nun Katarina decidis resti ĉe sia patrino. La juna Katarina venis al Romo kune kun du virinoj amikinoj kaj neniu malpli ol la

marŝalo de la reĝo. Kiam ili venis al la kardinala palaco en Romo, Birgitta ne troviĝis tie. Dum tuta semajno Birgitta kaj ŝiaj geamikoj serĉis. La bona Petrus Olavi sentis, ke li devas reveturi al Romo kaj tie li trovis Katarinan.

Birgitta estis en Farfa kaj tie donis al la abato riproĉadon. Li iĝis konvertita al sankta vivo. Kiam Birgitta revenis al Romo, la filino decidis resti ĉe sia patrino.

La patrino de Dio

Birgitta komencas ricevi siajn revelaciojn de Maria. La katolikoj preĝas ĉiutage: *Sankta Maria, patrino de Dio, preĝu por ni, ŝuldantoj.*

Klemento VI estis papo de 1342 ĝis 1352, sed li havis sian sidejon en Avignon en Francio.

La patrino kaj la filo

La plej amata filo de Birgitta estis Karl ULFSSON. La preĝoj de Birgitta kreis ĉe la filo apartan diotimon kun la sekvo, ke li post peko tuj konfesis sin.

Inocento VI estis papo de 1352 ĝis 1362. Birgitta salutis lin kun ĝojo kaj granda atendo. Birgitta frue interesiĝis pri la antaŭdiro pri la alveno de Antikristo. Ŝia sveda instruisto Matthias unufoje demandis ŝin, ĉu ŝi povis informiĝi kiam oni povus atendi la teruran Antikriston.

Dum la terura pesto en Avignon, kien multaj malfeliĉuloj rifuĝis, forpasis sepdek mil homoj, inter ili naŭ kardinaloj. Pri la papo Inocento Birgitta skribas, ke li estas pli abomeninda ol la judaj uzuristoj.

Birgitta iris al Asizo, la urbo de Francisko kaj restis tie kvin tagojn, dum ŝi spertiĝis pri la grandaj memoraĵoj de la

loko. Kune kun siaj kamaradoj ŝi iris en la preĝejo por konfidi sin en la ŝirmado de la sanktulo dum la vojaĝo. Ŝi sentis simpatian kun la Franciskanoj kun kiuj ŝi havis grandan solidarecon. Birgitta troviĝas portretita inter la Franciskanaj sanktuloj.

Birgitta restis plurajn jarojn en Napolo. Ŝi deziris vidi ĉiujn gravajn pilgrimajn lokojn de la urbo. Granda morala disfalo regis ĉirkaŭ la vivĝoja reĝino GIOVANNA.

La politiko en la hejma lando

Hejme en Svedio regis granda malkvieteco kaj dissplitiĝo. La reĝo Magnus ERIKSSON havis plej grandajn malfacilaĵojn por majstri la landon. La sveda reĝo estis arestita de la sveda nobelaro. Kiel regento proklamiĝis lia filo, la norvega reĝo HÅKAN. En 1362 li estis elektita kiel sveda reĝo sur herbejo apud Uppsala. Skanio perdiĝis al Danio. Dum revelacio Birgitta eksciis, ke Skanio por ĉiam povas aparteni al Svedio. Tio plenumiĝos tri jarcentojn poste. La plej aĝa filo de Birgitta, Karl ludis grandan rolon, kiel sveda politikisto kaj ankaŭ kiel peranto de leteroj al la patrino. La tutan tempon oni atendis, ke Birgitta revenos, post kiam ŝi devigis la papon reveni al Romo.

En la jaro 1362 la reĝo realigas la donacon de la reĝa bieno de Vadstena al la monaĥeja institucio, kiun lia patro reĝo Magnus difinis en la testamento.

Birgitta parolis kun trankvila aŭtoritato kaj kun granda psikologia scio.

Karlo IV (1316–1372) iĝis germana imperiestro en 1346. Li estis la plej simpatia, saĝa kaj sukcesplena inter ĉiuj germanaj imperiestroj. Li venis al Romo printempe 1355 por esti kronita

de la papa sendito. Birgitta atendis ĝis ŝi povis renkonti la papon, la imperiestron samtempe en Romo, kio post iom da tempo okazis.

La imperiestro Karlo revenis aŭtune 1368 kaj tiam kune kun la papo Urbano V. Estis historia momento, kiam ŝi povis prezenti sian monaĥejan projekton.

Estas la ĉiam repetita, neŝanĝebla opinio de Birgitta: ŝia kongregacio estas la propra faro de Dio, ĝi estas por ĉiam konfirmita en la ĉielo, ĝi nur bezonas la sankcion de la papo, por ke ĝi validu inter la homoj. Urbano V estis elektita unuanime en 1362. Li ĉesigis la pompon, kaj la malŝarpadon, kiu pli frue karakterizis la papan kortegon en Avignon.

Birgitta admonis siajn filojn Karl kaj Birger veni al Romo por fortigi ŝian pozicion. Ambaŭ estis en Svedio alte rangitaj kaj eminentaj viroj. Imperiestro Karlo kaj la papo Urbano fine ambaŭ venis al Romo. Magnus PETRI rakontas, ke li ĉeestis kiam Birgitta rakontis al la papo kiam Dio aperis al ŝi, multaj atestantoj aŭdis tion, inter aliaj membro de la dinastio ORSINI.

Birgitta havis certecon, ke ŝi estis vokita de Dio por unika farado de sama speco kiel ekzemple la disĉiploj.

Inter samlandanoj en Italio

Birgitta estis tute ne sola en sia domo. Ni konas la nomojn de pluraj el ŝiaj servistinoj. Ni scias la svedajn monaĥojn, kiuj pli aŭ malpli longan tempon loĝis tie. Pluraj riĉaj kaj multinflujaj svedaj viroj kaj virinoj estis ŝiaj gastoj. La bopatrino de la filo Karl, Ingeborg ERIKSDOTTER kiel vidvino venis al Romo la saman jaron kiam Birgitta translokiĝis al sia nova hejmo.

La kavaliro Magnus PETRI venis al Romo post la morto de sia edzino kaj restis ne pli ol 18 jarojn, servante Birgittan. Li estis unu el la plej bonaj atestantoj dum la kanonizadoproceso, iĝis ĝenerala konfesorino en la monaĥejo de Vadstena kaj ĉeestis je la solenaĵoj en Romo. La monaĥejo estis inaŭgurita 11 jarojn post la morto de Birgitta en 1384.

Romaj geamikoj

Profunde ofendita kardinalo kaj episkopo trovis konvene doni al ŝiaj vortoj disvastigon en la paroĥo. Ŝi estis malamiko de Romo, kaj estis tute freneze, ke tia norda virino povis loĝi en pompa kardinala palaco.

La famo de la intensa kritiko de Birgitta pri Romo, la romanoj kaj pri la papoj atingis kun la tempo Avignonon. Kvar jarojn post la alveno de Birgitta al Romo aperis la anstataŭanto de la kardinalo DE BEAUFORT ĉe Birgitta, kaj informis strikte ke ŝi devis akcepti forlasi la palacon kaj serĉi alian loĝejon. Vere Birgitta kaj la papoj estis en akordo — Romo estis antaŭ ĉio urbo de peko kaj dekadenco. Dum pentekosto Birgitta troviĝis kun sia amikino Franceska en la Petropreĝejo. Svedaj mesaĝistoj kunportis tion kion Birgitta bezonis, amason da oro kaj arĝento.

Birgitta nun ricevis grandan domon ĉe la periferio de la urbo. Eble tiu nivelo ebligis por ŝi konatiĝi kun la aristokrataj familioj de Romo, precipe la granda kaj potenca familio ORSINI.

Post la reveturo de Urbano al Avignon kaj lia morto elektiĝis nova papo sub la nomo Gregorio. Tiam Birgitta faris sian eblon instigi la papon resti en Romo kaj ne reveni al la abomenata Avignon.

En Napolo kaj Cipro

Unu el la plej observataj mirkuracoj okazis en Napolo en 1365. Sinjorino LAPA troviĝis en pilgrima veturo en Napolo, kiam ŝia dekjara filo Esau iĝis ege malsana. Ŝi alvokis Birgittan kaj petis ŝian helpon. Birgitta tuŝis la korpon de la knabo kaj krucosignis lin, post kiam li resaniĝis.

La 10an de marto 1372 Birgitta kun siaj gekamaradoj supreniris la ŝipon, kiu transportos ilin de Napolo al Palestino. La unua haltejo estis Cipro. La episkopo Alfonso rakontas pri la paniko, kiu regis, kiam la ŝipo troviĝis en mara danĝero, sed Birgitta havis neŝanceleblan trankvilon. La reĝo de Cipro ankaŭ estis formale reĝo de Jerusalemo, kiun li ne povis administri. Birgitta kunvokis la reĝinon kaj ŝian filon, eminentajn baronojn kaj altajn oficistojn en Nikozio kaj havis tie paroladon.

Legante la propran manuskripton de Birgitta, oni trovas, ke ŝi faris grandiozan paroladon. Ŝia parolado estis zorge ellaborita kaj elokventa. La antaŭdiroj de Birgitta pri la tuta ruiniĝo de Cipro praviĝis. La militŝiparo de Genovo okupis kaj prirabis Famaguston.

Palestino

Malmultaj el la revelacioj de Birgitta estas tiel multe legitaj kiel ŝia priskribo de la Jesua naskiĝo. Dum sia tempo en Palestino Birgitta malsaniĝis. Ŝi devis pro febro kaj senforteco resti plurajn monatojn. Evidente ŝi ne poste resaniĝis de tiu malsano, kiu estis ŝia lasta.

Denove en Napolo kaj ŝia morto

La ĉefepiskopo de Napolo serĉis Birgittan post la hejmenveno kaj informis, ke li en la nomo de la reĝino GIOVANNA petis ke ŝi preĝu por Napolo kaj ĝiaj loĝantoj. La ĉefepiskopo petis Birgittan rakonti kiamaniere ŝi povas ricevi viziojn de Dio mem. Ŝi respondis kviete al ĉiuj demandoj.

Post monato en Napolo, rajdis Birgitta kun ŝia societo al Romo, kie ŝi venis al sia loĝejo. La 18an de julio Birgitta ricevis revelacion, kie Kristo antaŭdiris la tagon kaj horon por ŝia venonta morto. Katarina dormis en la ĉambro apud sia patrino. Ŝi tiam petis la prioron Petrus OLAVI veni, kiu donis al Birgitta la sakramentojn kaj la lastan sanktoleadon. Li povis transpreni ĉiujn skribaĵojn de Birgitta por redaktado.

Kiam Birgitta ricevis la lastan sanktoleadon, ŝi alvokis siajn konfesprenantojn, Katarina kaj Birger kaj rakontis al ili, ke ŝi per propraj okuloj vidis Jesuon je la altaro en sia ĉambro. Kun la okuloj al la ĉielo Birgitta diris: *En viaj manoj, Sinjoro, mi transdonas mian spiriton*, kaj en la sama momento ŝi endormiĝis.

Ŝi estis entombita en Romo kaj estis transportita de Katarina kaj la frato Birger al Svedio. La tuta veturado de Romo al Vadstena postulis 7 monatojn.

11 jarojn post la morto de Birgitta, ŝia klostra projekto estis realigita. En la jaro 1384 estis inaŭgurita la monaĥejo de Vadstena.

Arne LUNDKVIST

SE JESUO KRISTO NE RELEVIĜIS

(Teksto: 1 Korintanoj 15:12–20)

Ĉiujare, la kristanoj tutmonde apartigas dimanĉon en marto aŭ aprilo por rememori kaj festi la releviĝon de Jesuo Kristo. Kial ili alligas tiom multe da signifo al tiu solenaĵo? Ĉu estas ia diferenco nun, ĉu Jesuo Kristo estas mortinta aŭ vivanta? La fondintoj de la famaj mondereligioj estas ja mortintaj. Kion oni diru se ankaŭ Jesuo Kristo ne releviĝis el la mortintoj?

Unu el la problemoj de la unuaj jarcentaj korintaj eklezianoj kiu instigis Paŭlon skribi sian unuan epistolon al ili estis la neo de korpa releviĝo — instruo kiu rampis en la eklezion subinflue de la greka kredaĵo pri nemorteco de la animo sole. Laŭ ordinara greko, estis nenia korpa releviĝo de la mortintoj. Eĉ la sadukeoj — sekto de la Judoj — ne kredis je la releviĝo de mortintoj (Mateo 22:23; Marko 12:18; Luko 20:27; Agoj 23:8).

La bazo de la kristanaj mesaĝoj kaj vivo estas la releviĝo de Jesuo Kristo. Se ni dudek-unuaj-jarcentaj Kristanoj dubas la releviĝon de la mortintoj, tial ni devas akcepti ĉi tiujn ses logikajn argumentojn:

La unua argumento por la releviĝo de Jesuo Krsito kaj aliaj kredantoj estas ke la kristana mesaĝo estus vana se Jesuo Kristo ne releviĝis. Paŭlo fieri diris je 1 Korintanoj 2:2, „Ĉar mi decidis scii ĉe vi nenion, krom Jesuo Kristo kaj tiu krucumita”. Vidu ankaŭ 1:22; 15:3–4; Galatanoj 3:1; 6:14. Krucado en la unuaj-jarcenta greka kaj romia mondo estis tre malhonora puno por krimuloj. Se Jesuo

Kristo ne releviĝis, ĉu fierindas prediki pri krucumita ulo?

La dua argumento koncernas la kristanan kredon. La kristana kredo ripozas sur la krucumita kaj releviĝinta Jesuo Kristo. Estas nenia nomo sur la ĉielo per kiu ni devas esti savitaj. Petro klare diris dum sia defendparolado antaŭ la Sinedrio: „...estu sciata al vi ĉiuj kaj al la tuta popolo Izraela, ke en la nomo de Jesuo Kristo, la Nazaretano, kiun vi krucumis, kiun Dio levis el la mortintoj, ci tiu staras sana antaŭ vi. Tiu estas la ŝtono, kiun vi konstruantoj malŝatis, kaj kiu fariĝis ŝtono bazangula. Kaj en neniuj aliaj estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj” (Agoj 4:10–12). Jesuo Kristo estas la Vojo! Tia kredo je Jesuo Kristo estus vana — malplena, senefika, sensukcesa se Jesuo Kristo ne releviĝis.

La predikantoj de la evangelio estus fifamaj mensoguloj kaj falsaj atestantoj, se Jesuo Kristo ne releviĝis. La Skriboj estus unu el multaj misgvidantaj libroj en la mondo. Tamen reaŭskultu Petron: „Ĉar ne sekvinte fabelojn sofismajn, ni koniĝis al vi la potencon kaj alvenon de nia Sinjoro Jesuo Kristo, sed vindinte per propraj okuloj lian majeston” (2 Petro 1:16).

Jesuo Kristo estas nia ofera ŝafido kiu „repacigis” niajn pekojn per Sia morto (Romanoj 3:25; Hebreoj 2:17; 1 Johano 2:2; 4:10). Li estas la anstataŭulo por la puno kiun ni meritas pro niaj pekoj. Pro ĉi tiu, ni ne estos juĝitaj (Romanoj

"EŬROPA BULTENO" REVIVIĜAS

Internacia sendependa revuo „La Ondo de Esperanto”, eldonata en Kaliningrado (Ruslando), ekde sia marta numero enhavas specialan kvarpaĝan aldonon kun la titolo „Eŭropa Bulteno”. Per tio reviviĝas la „Eŭropa Bulteno”, kiu ĉesis aperi en 2002 post la ekiĝo de

Umberto Broccatelli kiel prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio.

„Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj ŝtatoj sendependaj kaj maligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazaĵoj kaj kontraŭiri la sperton akumulitan de

8:1), ni estas justigitaj (Romanoj 5:9). Sendube, se Jesuo Kristo ne releviĝis el la mortintoj, Lia morto estus vana, kaj ni estus en niaj pekoj, kaj ankoraŭ portas la kulpon kaj kondamnon de peko. La kialo de la releviĝo de Jesuo Kristo estas la pruvo ke Lia morto efektive liberigis nin de niaj pekoj.

Jesuo Kristo promesis en Johano 11:25-26, „Mi estas la releviĝo kaj la vivo; kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos, kaj ĉiu, kiu vivas kaj kredas al mi, por ĉiam ne mortos. Ĉu vi tion kredas?” Vidu ankaŭ en Johano 3:36; 5:21; 6:39-40, 44. Se Jesuo Kristo ne releviĝis el la mortintoj, tiaj promesoj estas vanaj, kaj ne nur la mortintaj, sed eĉ la vivantaj kristanoj iros inferen. Eterneco estus iluzio.

Se la supra argumento estas vera, kristanoj estus la plej kompatindaj el ĉiuj, ĉar havus nek kialon, nek celon de la vivo. Se kristanoj havas esperon nur por ĉi tiu vivo, ĝi estos plej katastrofa por ili, kaj nekredantoj estas pli bonaj ol ili.

Ĉu la grekoj, la sadukeoj, aŭ eĉ la tuta mondo kredas la korpan releviĝon, ĉu ne, la bona novaĵo estas ke Jesuo Kri-

sto ja releviĝinta el la mortintoj (Mateo 28:1-6; Marko 16:2-7; Luko 24:4-7; Johano 20:1-9; Agoj 1:3; 2:23-24, 32; 13:30; 17:31; 1 Korintanoj 15:3-4; Hebreoj 13:20). Li estas viva! Li venkis pekon, morton, kaj la diablon!

En 1 Korintanoj 15:3-8, Paŭlo kronikis kelkajn historiajn eventojn kiuj servas kiel pruvo de la releviĝo de Jesuo Kristo. Efektive, Lia apero al kelkaj homoj dum la periodo de kvardek tagoj estas konvinka pruvo ke Li estas viva (Agoj 1:3). Li ankoraŭ aperas al multaj homoj nuntempe. Laŭdu la Eternulon!

Glorata estu Dio por plenumi Siajn promesojn relevigante Jesuon Kriston el la mortintoj. Tamen, ĉu Lia releviĝo havas ian signifon por vi? Ĉu ĝi havis ian influon en via vivo? Ĉu vi travivis la faron de savo kiun Jesuo Kristo perfektigis en Sia releviĝo? Memorhonorante ĉi tiun historian eventon ne esti sole je aparta tago ĉiujare, aŭ eĉ je ĉiu unua tago de la semajno, sed je ĉiu tago de niaj vivoj.

Je la servo de Dio,
pastoro Bayo AFOLARANMI

la tempo”. Tia estis la profeta malfermo de ĉiu numero de „Eŭropa Bulteno” ekde decembro 1999, citita laŭ la vortoj de usona ŝtatisto Alexander Hamilton. Broccatelli redaktis 21 numerojn kaj en la lasta numero deklaris, ke li restas fidela al siaj idealoj Eŭropa kaj Esperanta.

Nova generacio, interalie Seán Ó RIAIN kaj Dafydd ap FERGUS, transprenis en 2002 la gvidadon de EEU kaj de la nove kreita Brusela Komunikadcentro. La energio de BKC komence tute direktiĝis al kreado de interreta komunika sistemo kaj konstruado de alirejoj al politikistoj kaj varbado de kunlaborantoj. Nun venis la tempo por redoni atenton al la komunikado kun malretaj esperantistoj. En aprilo 2003 aperis provnumero de nova „Eŭropa Bulteno”. Post traktado kun la eldonejo „Sezonoj”, estis trovita solvo por certigi profesie aranĝitan raportetaron pri la Eŭropa Unio.

Dafydd ap FERGUS redaktos ĉiumonate kvar paĝojn en la — cetero tre interesa — senpartieca magazino „La Ondo de Esperanto”. En la marta eldono aperis: „Bilbao bonvenigas Esperanton”, debato pri Esperanto en la Franca Asembleo, kvin novaĵoj pri Esperanto kaj Eŭropa Unio, „Kiu inventis la eŭron” kaj raporto pri la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo. La aprila numero aperos la 20an de marto.

Oni povas aboni al „La Ondo de Esperanto” (samtempe, kaj sen plia pago, al „Eŭropa Bulteno”) kontraŭ 25 eŭroj jare (15 eŭroj por orienteŭropanoj) ĉe UEA kaj pluraj landaj perantoj. Petu pliajn informojn rete ĉe: sezonoj@gazinter.net

informas EEU kaj
„La Ondo de Esperanto

Jara raporto 2003 el Kongolando

La jaro 2003 estis por KEKO labora jaro. Multaj agadoj okazis, interalie:

- la organizado de kursoj
- la kvardekjariĝo de la movado de Esperanto en Kongolando kunlabore kun la nacia Asocio.

Financa raporto

	ENSPEZOJ	ELSPEZOJ
Membrokotizoj	60 \$	—
Subvencio	—	—
Varbado	—	60 \$
Instruado	60 \$	50 \$
dekjariĝo	—	40 \$
utilago de la lingvo	60 \$	60 \$
	180 \$	210 \$
Saldo	-30 \$	

ĜENERALA ASEMBLEO

La 9an de marto KEKO kunvenis kadre de la Ĝenerala Asembleo. La partoprenintoj salutis kun granda ĝojo la alvenon de la prezidanto MUNGULU Mupungu, kiu delonge foriris la organizaĵon.

La prezidanto certigis nin ke tiufoje li volas labori por Esperanto kaj KEKO por ke ni iru antaŭen. Nun ni devas labori aktive kun KELI kiu ne preskaŭ konsideras nin, estante Afrikanoj.

Konsisto de la estraro de KEKO:

Mupungu MUNGULU — prezidanto
Leonard MATONDO — kasisto kaj sekretario,

LUVITU kaj MBONDO — konsilantoj

Ni dankas vin

La prezidanto M. MUNGULU
La sekretario L. MATONDO.

LUTHER EN LA KASTELO COBURG 1530

Okaze de la forpaso de Adolf BURKHARDT la familio elektis por la funebra anonco biblian vorton el la psalmo 118: „**Mi ne mortos, sed mi vivos, kaj mi rakontos la farojn de la Eternulo**”.

Tiu ĉi vorto ankaŭ estis ŝatpsalmo de Martin LUTHER. De aprilo ĝis oktobro de la jaro 1530 LUTHER estis en la kastelo kaj fortikaĵo Coburg, ĉar li pro la regna kaj eklezia anatemo ne rajtis daŭrigi la vojaĝon al Aŭgsburg. Li tradukis en Coburg la restintajn profetojn. Laŭ la tradicio li estis skribinta la cititan psalmvorton sur la muro de lia laborĉambro. En la korto de la kastelo estas trovebla la en 1907 kreita LUTHER-monumento sur muro kun busto kaj la sentenco en latina lingvo.

Sur la regna parlamento en Aŭgsburg Philipp MELANCHTON anstataŭis LUTHER kaj la „*Confesio Aŭgustana*” estis legata antaŭ la imperiestro. Sed li malakceptis tiun ĉi unuan konfesion de protestantismo. Tio estis la finfina disiĝo inter protestantoj kaj katolikoj.

LUTHER tion ne intencis kaj ankaŭ ne Adolf BURKHARDT. Li ĉiam en rimarkinda maniero pledis por la ekumeno kiel paciĝintan diversecon.

En mia librostoko mi trovis kajereton pri „*La Malgranda Katekismo de d-ro Martin Luther kaj la Aŭgsburga Konfesio*” eldonita en 1961 en Germanio kaj tradukita de Richard HOPPE, kiu en la antaŭparolo dankas inter aliaj Adolf BURKHARDT, Karl Olof SANDGREN, pastoron DOWNES kaj Henk DE HOOG por la tradukhelpo.

S. KRÜGER

La LUTHER-rozo

Kiam mi antaŭ mallonga tempo vizitis lokojn, kie Martin LUTHER vivis, mi ĉie estis konfrontita kun tiu ĉi rozo.

Jam en la jaro 1516 li evoluigis el sia familia blazono la signon de la LUTHER-rozo, kiun li interpretis kiel alegorio de sia teologio. En letero je la 8a de julio 1530 li diris:

„La unuo estu kruco: nigra en la koro, kiu havas sian naturan koloron, por ke mi mem havu memorigon, ke la kredo al la krucumito nin beatigas. Ĉar la justulo vivos sian kredon, la kredon al la krucumito. Tia koro staru enmeze de blanka rozo por indiki, ke la kredo donas ĝojon, konsolon kaj pacon. Pro tio la rozo estu blanka kaj ne ruĝa, ĉar la blanka koloro estu tiu de la fantomoj kaj anĝeloj. Tia rozo staras en ĉielkolora kampo, ke tia ĝojo en la spirito kaj kredo estas komenco de la estonta ĉiela ĝojo. Kaj en tia kampo ora ringo, ke tia beateco en la ĉielo daŭros eterne kaj ne havos finon kaj ankaŭ belega estas super ĉiu ĝojo kaj posedaĵoj, kiel la oro estas la plej granda, altvalora kaj belga erco”.

Siegfried KRÜGER

